2-a Jaro, N-o 1 (53)

APERAS SAT SEMAJNE

1. Oktobro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktejo: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz	Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Pri la rezultoj de la V. Kongreso de SAT.

(RADIO ESPERANTO PAROLADO DE E. DREZEN EL MOSKVO LA 10. SEPTEMBRO 1925)

Kamaradoj de la tutmondo!

Mi ĵus finis la rusan parton de mia parolado pri la V. Kongreso de SAT okazinta en Vieno.

Nun mi volus transdoni al vi ekstersovetiaj esperantistoj kaj SAT-anoj kelkajn konsiderojn pri la estonta laboro, pri la progresigo de nia afero kaj de nia SAT.

Esperanto estas mirinda instrumento, kiu helpata de Radio nepre forigos kaj eĉ jam nun forigas la limojn kaj barojn, starigitajn inter laboruloj diversnaciaj.

Se ni parolus nuna-momente germane, aŭ france aŭ angle — verŝajne la nombro de aŭskultantoj estus pli granda ol nun, sed tiam oni nin komprenus nur sur unu certa kaj limigita terspaco.

Nune — parolante Esperanton, ni scias ke oni nin aŭdas kaj komprenas same en la landoj apudaj — Litovio, Latvio kaj Polio, same en Germanio, Anglio kaj ĝis Barcelona, ĝis la bordoj de malproksima Atlantika oceano.

Ni esperantistoj laboristoj estas ankoraŭ malmultnombraj, sed nia nombro kreskas konstante, kaj nia potenco konsistas en nia unueco, en monoliteco[1]), firmeco de nia unuiĝo.

En la tuta mondo ni vidas gravajn konfliktojn, kiuj dividas la laboristaron en diversaj grupoj kaj frakcioj.

Ni vidas en la tuta mondo atakon de la kapitalistoj kaj ekspluatistoj direktitan kontraŭ la laboristaro. Laboristaro dividata laŭ frakcioj — ne povas kontraŭstari al la atakoj de la kapitalo. Por gvidi la batalon kaj gvidi ĝin sukcese — necesas unueco. Ni estas certaj, ke tiu unueco fine venos kaj ke ĝi devas veni. En la unueco de laboristaro estas kaŝita ĝermo de la venko de la proletaria klaso. Kaj la proletaria klaso estas nepra, sendisputa venkanto por la tago morgaŭa. Ni esperantistoj-revolucianoj, ni SAT-anoj devas esti fieraj, ke en nia malgranda rondo ni starigas modelon de unueco kaj de unueca fronto.

Dum la lasta kongreso en Vieno gravaj simptomoj minacis nian laboron kaj nian movadon. Oni povis atendi, ke kelkaj kamaradoj tro partiecaj kaj doktrinemaj lasos fali la belan verkon de SAT. Sed feliĉe la timoj estis vanaj. Ni restis kaj ni restos.

Dum la kongreso oni parolis pri SAT kiel pri kultura asocio. Tio estis tute ĝusta. Kultura asocio ĝi estas; sed kultura asocio en la servo de la proletaria klaso.

Ne necesas, ke ni faru propagandon en SAT por niaj specialaj politikaj idealoj. Ni argumentu per faktoj. Ni citu sole la faktojn. La faktoj posedas mirigan econ de la klerigado, de la kulturigo.

Ni scias kion povas atendi la laborista klaso de la milito venonta. Ni ĉiuj bone konscias, kia devas esti la pozicio laborista kontraŭ la milito imperialista. Ŝajnas tute ne necesa paroli pri tio, nek dum kunsidoj de SAT-anoj, nek sur la paĝoj de nia gazeto "Sennaciulo". Pri ĉi-tio la tuta laborista klaso neeviteble estos samopinia. Sed se ni pretendas esti unuecfronta asocio, se ni volas, ke niaj membroj — simplaj laboristoj faru mem la kontrolon pri la taktiko necesa, ni citu la agojn de la laboristaj gvidantoj, de diversaj parlamentanoj ktp.

Ni bone scias, ke la mondmilitoj okazis kaj sukcesis okazi pro malĝustaj agoj de la laboristaj gvidantoj. La laborista klaso devas observi siajn estrojn elektitajn. Kaj anstataŭ propagando de diversaj tendencoj inter SAT-anoj, — por ni, por SAT kaj por "Sennaciulo" — tute sufiĉos se ni kontrolos la rilaton de la oficuloj laborist-unuiĝaj al la milito, al la senlaboreco, al la aktualaj problemoj de l' momento.

Oni povas tute trankvile aserti ke la SAT-anaro devas kaj povas esti avangardo plej klera kaj plej organizita de la unuecfronto laborista.

Ĉiu SAT-ano estas esperantisto. Do ĉiu SAT-ano jam atingis tiun gradon de inteligenteco, kiu permesas konsideri la faktojn ne nur de loka, nacia vidpunkto, sed ankaŭ de vidpunkto tutmonda, de vidpunkto interesa kaj utila por la tuta laborista klaso.

Tiu eco kaj tiu grado de inteligenteco estas tre valora por ni. Kaj se ni iros la vojon antaŭe skizitan, la nivelo kultura, la konscia rilato de la SAT-anoj al la klasproblemoj nepre kreskos kaj larĝiĝos.

Tiamaniere SAT plenumos sian rolon de kulturiga, edukiga instrumento por la bono kaj triumfo de la laborista afero.

Sed ni devas ja ne nur zorgi pri kulturo. Ni devas ankaŭ batali. En multaj landoj nune regas la blanka teroro. Kaj estus malinde por laboristoj-esperantistoj, se ili ne partoprenus la laboron aktivan, laboron revolucian — en unuiĝoj profesiaj kaj partiaj.

Ni scias, ke SAT estas en kelkaj landoj persekutata, sed niaj kamaradoj tamen laboras kaj laboras plej energie.

[1]) Unuŝtoneco, t. e. solideco.

Ni devas rekomendi al niaj kamaradoj plenan utiligon de Esperanto por la bono de la laborista movado. En kelkaj landoj la Esperanto-movado, mi ne parolas pri SAT-movado, estas sola legala, leĝe allasata formo, sub kiu povas kreski laboristaj grupoj. Ni atentu tiun eblecon. Ni ĝin plene bonuzu. Ni bone memoru, ke Esperanto estas per si mem tre potenca revoluciigilo, ĉar ĝi vastigas la koncepton, la ideojn de la homoj. Ni servu per Esperanto kaj per niaj publikaj unuiĝoj — al la celoj kaj aspiroj de nia klaso. Ni estu kulturigaj laborantoj, sed ni estu samtempe veraj revolucianoj.

Mi estas certa, ke Esperanto triumfas kaj progresas nur dank' al tio, ke ĝi ĉiutage pli kaj pli penetras en la ĉiutagan vivon kaj agadon de la klaso laborista — la mastro de la tago morgaŭa.

La klasoj burĝaj mortantaj — ne povas doni al la homaro tian grandiozan donacon, kia estas kaj kia estos la lingvo internacia. Efektivigi tiun donacon povas nur la klaso laborista, klaso kreskanta, celanta potencon kaj akironta ĝin.

Do la tasko de ĉiuj sinceraj esperantistoj estas — nepre helpo al la movado laborista-esperantista. La laboristoj-esperantistoj, la SAT-anoj ne malakceptu la helpon, kiun al vi povas prezenti la inteligenta — ne manlaborista esperantistaro. Ni ne povas allasi personojn fremdajn al ni — en nian rondon por ĝin gvidi kaj administri. Ni ne povas havi oficulojn de laboristaj grupoj kaj SAT, elektikaj el ne sufiĉe firmaj, ne sufiĉe klaskonsciaj personoj. La gvidadon de nia afero devas konservi en siaj manoj la laboristoj — mem. Nur tiam ni evitos aferon de diversaj aŭtoritatuloj, kiuj finfine povus entombigi la klasbatalajn tendencojn kaj ideojn de SAT.

Sed rezervante en niaj manoj la administran potencon, ni larĝe uzu la kulturan, la inteligentan helpon de la spertaj esperantistoj, eĉ se ili ankoraŭ ne venis al ni, eĉ se ili ankoraŭ apartenas al la tiel-nomata neŭtrala Esperanto-movado. Venos tempo, kaj ĉiuj honestaj ĉiuj sindonaj esperantistoj estos kun ni. Ĉar en la manoj laboristaj troviĝas la estonto de Esperanto, same kiel en la manoj laboristaj troviĝas la estonto de la homaro.

Tion ni sciu, tion ni fidu — kaj nia afero progresos. Ni iru trankvile kaj firme la vojon celitan.

Rimarko. C. K. de SEU petas aŭskultantojn nepre informi pri aŭdebleco de radio- paroladoj el Moskvo — laŭ adreso "Moskvo poŝtkesto 630 SEU". Tiuj informoj servos por konvinki certajn instituciojn pri uzebleco kaj uzindeco de nia lingvo.

FIRMIGU LA BAZON DE VIA GAZETO PER VIGLA VARBADO!

Letero el Turkio

Konstantinoplo, 9. septembro 1925

Kontrastoj. — De tiom longe mi sopiris vidi la nepriskribeble belan *Bosforon*, la senkompare mirindan *Oran Kornon!* De tiom longe mi deziregis paŝi sur la lokoj famegaj ne nur pro ilia beleco, sed ankaŭ pro la tieaj okazintaĵoj pri kiuj rakontas la Legendo kaj la Historio! . . . .

Okazis ofte, ke la realaĵo malpli efikis sur min ol la bildo, kiun image mi vidis antaŭe. Ĉi-tie ne trafis min tia disreviĝo. Konstantinoplo povas ja spitinviti ĉiun ajn verkiston, ke li priskribu ĝin fidele, ĉiun ajn pentriston, ke li bildigu ĝian veran figuron.

Mi ankoraŭ ne vidis ĉion vidindan, sed jam konvinkiĝis, ke ĉi-tiu kosmopolita urbo estas bilde nekaptebla. Okcidentaĵoj kaj orientaĵoj interpuŝiĝas, intermiksiĝas kaj kreas ion nedifineblan. Grandaj stratoj, kiujn trakuras tramveturiloj kaj aŭtomobiloj, najbaras kun stratetaĉoj malglatege pavimitaj, nur piedireblaj kaj sur kiuj svarmas ĉifonvestitaj homoj. Altaj novaj domoj, belaj magazenoj najbaras kun kadukaj domaĉoj, kun mizeraj budoj. Per unu sola ekrigardo oni povas vidi la Mezepokon kaj la XXan Jarcenton. En Stambul[1]) ĉie superstaras imponaj moskeoj[2]) kun pezaj kupoloj kaj elegantaj minaretoj. Ĉie kuŝas ruinaĵoj, ruboj, malpuraĵoj. Ĉie ankaŭ novaj konstruaĵoj. Kontrastoj okulfrapas ĉe ĉiu paŝo.

Ĉu ne estas mezepoka kutimo, ke por transiri la pontojn oni devas pagi unu piastron? Aŭtomobiloj tie haltas pro tiu pago. Sur la *Nova Ponto* 24 viroj dejoras kaj postulas la trairan depagon. Ili staras sesope ĉe ĉiu angulo de l' ponto kaj baras la tutan larĝecon de l' trotuaro. Nur la tramveturiloj ne estas haltigataj.

La popolamaso estas densa, diverskolore, diversaspekte vestita. Ĉie svarmas stratvendistoj kaj trudemaj almozpetantoj. Portistoj kun ŝarĝo kapabla terenpremi malfortan azenon marŝas pene, ŝvitante dum longa vojo kaj plenumas neplenumindan taskon. La homo estas ja ankoraŭ ŝarĝbesto — Dum rapide preterpasas, kvazaŭ insultante, aŭtomobiloj, kiuj portas homojn. Grandare glitas surakve malpezaj, plaĉaj "kaikoj" (barketoj) movigataj de fortaj brakoj — Dum vaporbarketoj rapide kaj facilmove preterpasas. Promenas belulinoj, obeantaj la lastajn ordonojn de la Pariza modo — Dum preteriras vualitaj virinoj, kiuj obeas ankoraŭ la Mahometanan leĝon. Fezoj, turbanoj najbaras kun eŭropaj kapvestoj . . .

Kontrastoj, ĉie kontrastoj.

* * *

Okcidento venkas. — Sed urĝas veni ĉi-tien por ĝui tiujn pentrindajn kontrastojn. Ŝajnas, ke la turkoj nun forte penadas por demeti la pezan tradicion, por forigi siajn apartecojn. La nuna registaro energie agadas por ke foriĝu la rutino, por ke definitive ruiniĝu la arkaikaj kutimoj. La prezidanto de la republiko, *Gazi Mustafa Kemal Paŝa*, persiste provas disrompi la religian kirason, kiu premkatenas la popolon kaj malhelpas, ke ĝi akceptu kaj profitu la okcidentan kulturon. Tiucele li entreprenis grandskalan agitadon. Lastatempe, li profitis la datrevenon pri la batalo ĉe *Bumlu-Punar*, kie li akiris mondfamon kaj ĉe la turka gento grandegan popularecon pro sia venko kontraŭ la grekoj, por alvoki la popolon, ke ĝi forlasu la malnovajn morojn, ke ĝi imitu la kulturitajn eŭropanojn.

Parolante en *Ineboli*, li forte akcentis pri neceseco definitive forlasi la malnovan vestmanieron. Li diris: "La internacia tualeto de la civilizitaj popoloj perfekte konvenas por nia nacio . . . ni kapvestu nin per vesto kun viziero, t. e., por paroli pli kare, per ĉapelo . . ."

Kaj nun jam multaj turkoj forlasis la fezon. La gazetoj sciigas, ke ĉe Angora, kiam revenos la Prezidanto, liaj akceptantoj estos kapvestitaj per ĉapelo. Eĉ decido de la ministraro igas deviga por la ŝtatoficistoj la uzon de ĉapelo.

Estas vera privestaĵa revolucio!

Rilate la virinojn, Mustafa Kemal ankaŭ energie postulas la forlason de la malnovaj kutimoj:

"En iuj lokoj, li diris, mi ankoraŭ vidis virinojn, kiuj kaŝas sian vizaĝon per iu tolaĵo, aŭ per sia antaŭtuko aŭ sin kaŝis kiam ilin preterpasis viro. Kia strangeco! Ĉu indas tiuj sovaĝaj moroj por patrinoj, por filinoj de civilizita nacio? Tia spektaklo estas ridinda kaj necesas senprokraste ĝin forigi . . ."

La amatoroj je pentrindaĵoj rapidu veni ĉi-tien, se ili volas ĝui la bildon de la malnova Turkio. La okcidenta kulturo antaŭeniras grandpaŝe. Kredeble, post deko da jaroj Konstantinoplo ne plu havos la saman figuron, ne plu estos rekonebla.

Ĉu domaĝe? Mi opinias, ke ne. La mirinda situo natura de la urbo restas ja la sama kaj nekompareble bela. Ne domaĝas se la stratoj estos pli glataj kaj malpli malbonodoraj; ne domaĝas, se la hotelĉambroj estos sencimaj; ne domaĝas se fezoj, turbanoj kaj aliaj malnovaĵoj estos videblaj nur en muzeoj . . .

La tradicio ĉiurilate estas ja malfacile mortigebla, sed ĝi tamen mortiĝos per la ripetataj batoj de la noviĝemuloj. Ĉe venkas la scienco, la tekniko. Kaj estas por ni, sennacianoj, ĝojige konstati, ke eĉ patriotisma, naciisma movado kiel tiu, kies Mustafa Kemal estas la ĉefrolulo, kaj kiu agitas la turkan genton, tamen helpas la malvolviĝon de la internacia kulturo, la proceson de la malproksima, sed tamen nepre okazonta sennaciiĝo de la popoloj.

E. Lanty.

[1]) Stambul estas unu de la tri partoj, disigitaj per la Bosforo kaj la Ora Korno, el kiuj konsistas Konstantinoplo. La du aliaj partoj estas Pera-Galata kaj Skutari. — Ĉi lasta troviĝas sur la azia bordo.

[2]) En la tuta urbo estas 700.

Litovio — lando de klerikaluloj.

Kiel aliaj, tiel nomataj demokrataj landoj, ankaŭ Litovio havas konstitucion kun ĉiuspecaj liberoj. Sed por litova registaro kaj policistaro konstitucio estas nur vanaj vortoj.

Policisto ĉiuspece turmentas litovajn civitanojn kaj registaro iliajn laborojn aprobas. Konstitucio garantias vortliberon, kaj policistoj ne permesis al k-do Ŝeras dum unua majo publike paroli hebree.

En aŭg. 1925 estis en Kaŭnas kunveno de kartonajlaboristoj por krei sekcion de preslaboristoj, kaj k-do Markelis (deputito de socialdemokrata frakcio en parlamento) parolis ruslingve, ĉar el 40 laboristoj nur du komprenis litovan lingvon. Policisto malpermesis al li paroli kaj fermis kunvenon. Kiam oni demandis policiston, kian rajton li havas por tion fari, li respondis, ke al li estas ordonite de lia estro.

En Ŝiaŭliai, plej granda litova urbo post Kaŭnas, malsobra policisto postulis de k-do Balakas, ano de urba administrado, ke li donu al li por manĝi. K-do Balakas rifuzis kaj venis al urba administrejo. Baldaŭ oni postulis lin al policejo. Kaj kiam li alvenis, li estis forte batita de malsobra policisto. Alia policisto lavis sian sangigitan vizaĝon kaj ordonis al li, ke li ne diru, ke li estis batita.

Policistoj batas sen ia kaŭzo ne nur anojn de socialdemokrata partio, sed ankaŭ simplajn laboristojn. Ekzemple en Ŝiaŭliai unu policisto batis ĝis sango unu veturigiston.

Kiu do ne scias, ke en januaro nunjare al kunvenintaj senlaboruloj policistoj en Kaŭnas mem pafadis!

Vi eble demandos min, kaj kion do faras juĝo? En nia lando oni juĝas kulpulojn nur post du aŭ tri jaroj, ĉar tiel multe estas da krimuloj (plejmulte politikkulpuloj), ke oni ne havas tempon tuj juĝi.

Kiel do pravigas tiajn agojn reganta partio?

Respondon al tiu ĉi demando ni trovas en oficiala organo de kristan-demokrata partio "Rytas" (Mateno). Tie ĉi unu deputito de parlamento skribas, ke socialdemokratoj estas kandidatoj al komunistoj, kaj oni devas socialdemokratan partion malpermesi.

Komunisto ĉe ni ne estas homo. Li estas kiel senrajta besto. Oni povas lin bati kaj elektrizi. Ekzemple, unu komunistino estas elektrizita. Policistaro tiun ĉi fojon ne povis kaŝi sian fiagadon. Socialdemokrataj deputitoj akre protestis kontraŭ tiu ĉi krimo kaj postulis puni fipolicistojn, sed klerikala Triunuo estas ĉiopova, ĉar ĝi havas plimulte ol duonon de ĉiuj deputitoj.

El kio do konsistas tiu ĉi Triunuo? Ĝi konsistas el kristan-demokrata partio (patro), el Asocio de Terkulturistoj (filo) kaj Federacio de Laboro (sankta spirito). Eble kamaradoj ne komprenas, kiel Federacio de laboro, do laboristoj, povas esti reakciuloj. Oni devas scii, ke litovaj laboristoj kaj ankaŭ vilaĝanoj estas tre malkleraj, kaj al ili pastra voĉo estas dia voĉo. Pastro diras, ke socialdemokratoj estas infanoj de diablo, ke ili estas komunistoj (plejgranda parto de litova laboristaro timas komunistojn) kaj pro tio veraj katolikoj ne povas esti socialdemokratoj, nek voĉdoni por socialdemokratoj.

Profesiaj unuiĝoj antaŭ tri jaroj estis multenombraj kaj nun estas en embria stato. Kial do tiel okazis? Antaŭe ili estis gvidataj de komunistoj, kaj dank' al ilia maltaŭga taktiko (malĝusta pritakso de la perspektivo) nun sub socialdemokrata gvidado ili devas denove organiziĝi. Kaj nun estas ne tiel facile. Reakcio estas plej granda, ankaŭ laboristoj timas, ke ne okazu kiel antaŭe. Nur senlaboreco devigas ilin organiziĝi sen longaj pripensoj.

4051.

LETERO AL KLASKONSCIULARO

de *Paul Crouch* kaj *Walter Trumbull.*

Tiel pacience kiel eble ni atendas la tempon kiam la karcer-pordego malfermiĝos kaj ni estos povantaj daŭrigi nian laboron por la movado. Imperialista maljusteco kaj persekutado eĉ ne ete detenis nin de nia tasko. Male, netaksebla kvanto da materialo estis metita je nia dispono, per kiu ni esperas helpi frakasi la tutan imperialisman strukturon.

La radikala nuanco de nia lingvo ne nur montras, kiel la imperialismo sentas la mas-simpation al ni, sed kiel ĝi timas pro tiu simpatio. La daŭra postulo por nia liberigo kaj la mas-mitingoj protestaj pro nia verdikto plue ektimigis la aŭtoritatularon.

Kolonelon Frederick M. Brown, kiu ludis la rolon de persekut-advokato por la U. S. armeo[1]) en la proceso, ni ĉi sube citas. „Mi ne povas koncepti ion pli difektigan al la arme-disciplino ol tian propagandon. Ĝi estas revolucia propagando el interno, pro kiu soldatoj estas instigataj al perforto kontraŭ la patrujo anstataŭ instruataj al ĝia protekto; ĝi estas la plej danĝera propagando."

La asertoj de Kolonelo Brown montras, kiel oni timas la revolucian propagandon, kaj samtempe ili montras la gravecon de laboro en la armeo. Multaj soldatoj en Fortikaĵo Shafter favoras nian aferon.

Ni esperas, ke la publikigo de nia proceso helpis al pli grand-skala starigo de solidareco laborista. Estas ja feliĉe, ke nia proceso estis tiomgrade disvastigita per la gazetaro kapitalista. Tiurimede ni atentigis homojn kiuj aliel neniam estus eksciintaj, kiel bagatelemaj kaj imperialismaj estas la reprezentantoj de la registaro.

Ni ricevis la lastan pakaĵon de libroj, sed pro sia kutima stulteco kaj aroganteco la oficistoj konfiskis ilin. Ni havis ilin preskaŭ du tagojn antaŭ ol ili estis konsiderataj kiel "danĝeraj aferoj" en karcero kaj ĉelo. "La aliaj soldatoj povas legi ilin kaj "ruĝiĝi," la malliberej-oficisto estis espriminta. La libroj estos poste al ni redonitaj.

Ĉiajn leterojn ni deziregas, ĉar estas tre konsolige en malliberejo scii, ke ankoraŭ estas grupo aŭ gruparo kiuj daŭrigas la laboron.

Kelkaj problemoj specialaj estas konsiderendaj koncerne al agado kun armeanoj. Unue, la interesoj de la armeanoj estas identaj kun la revolucia laborista klaso. Ili malklare sentas sin kiel viktimoj de imperialismo. Ili ĝin tiel ne nomas, sed ke ili estas daŭre regataj de sensenca subpremo, tion ili bone scias. Do, la soldatoj loĝas en grandaj kazernoj kie ideo, se plantita, rapide disvastiĝas.

Nescio estas la plej forta batalilo uzata kiel subpremilo. Per tiu sola faktoro la soldatoj estas tenataj en subeco.

Rasoj, koloroj kaj religiaj antaŭjuĝoj estas ĉiam interludataj de la superuloj. Jen la plej forta baro rompota de la organizisto. Se rompita, la laboro estos facila. La soldatoj estas supozeble rekompencataj por sia servuteco pro la penso, ke aliaj rasoj estas pli malsuperaj ol ili. Komunismo estas enkondukenda por ke la atavisma ideo estu elradikita.

Kion vi pensas pri internacia lingvo (Esperanto aŭ Ido) kiel helpo al nia propagando kaj por disrompi la naciajn limbarojn?

En Hawaii estas ideala kampo por la propagandisto. La grandparto de la grundo estas plantejegoj kie laboras filipinanoj, ĉinoj kaj japanoj. Salajroj estas escepte malgrandaj kaj vivelspezoj kompare altaj. Kompreneble tiuj rasoj vivas tre malkare pro sia nutraĵelekto. Vestaĵoj kostas al la laboruloj pli ol iuj aliaj objektoj.

Ankaŭ estas faktoro ke la supre nomitaj rasoj ne posedas rajton voĉdoni. La hawaii'-ano, kvankam li posedas la voĉdon-rajton, estas minacata sammaniere kiel la indiano amerika, t. e. lia sorto estas malapero. Ankaŭ tre malmultaj hawaii'anoj posedas valorecan grundon.

La filipinano, kiel la aliaj rasoj en Hawaii, estas efektive sklavo, tute indiferente, de kia flanko oni rigardas lian rangon. Frenezaj kaj fantaziaj fabeloj estas al li dirataj por persvadi lin ke li forlasu sian nasklandon, venu al Hawaii kaj estu laboranta ĉe usonaj plantejoj. Kvankam tiu sapveziko tuj disrompiĝas. Severa realeco baldaŭ forigas liajn iluziojn.

La celo de manovroj, kiuj antaŭnelonge okazis, estis impresi la sklavojn, kaj la popolojn de iliaj patrujoj, per la granda forto usona. Kvankam al iu ajn, kiu studis la milit-sciencon, la tuta afero ŝajnis kvazaŭ giganta farso kaj ĝi ridindigas la imperialistan Usonon; la vera intenco estis klara al ĉiu pensema kaj informita persono.

Gekamaradoj, via koncerno plivalorigas la vivon en malliberejo. Eksciinte, ke ni efikis por la afero, tio signifas ke spite de nia sorto persona imperialismo perdis je sia peno difekti komunismon, persekutante nin.

[1]) usona armeo

Ni estas dankaj por viaj ĝentilaj leteroj kaj por la libroj senditaj al ni, kvankam, bedaŭrinde, ni ne povas legi la leterojn nun. Tamen, la tempo alproksimiĝas, kiam kapitalismo ne plu povos deteni nin de nia elektita laboro.

Kun kamaradaj salutoj kaj bondeziroj por la sukceso de via laboro, por homarliberigo per la Revolucio.

Elangligis *Georgo Saville.*

TRA LA KLASBATALO

La ŝtata trusto "Sud-ŝtalo" ("Jugostal") — en Ukrainio — donacis el siaj profitoj de l' jaro 1924/1925) 1½ milionojn da rubloj[1]) por plibonigi la situacion de l' laboristoj.

La Ukrainia komitato de l' metalista sindikato decidis uzi *750 000* por la konstruado de domoj por la laboristoj en la industriaj lokoj Jenakievo, Makejevka, Stalino, Nijne-Dneprovsk, Ekaterinoslav; *500 000* por la konstruado de klubejoj ("laboristaj hejmoj"); *250 000* por konstruado de ripozejoj, lernejoj, manĝejoj, suĉinfanejoj, ktp.

La sovetia "Konsilejo por Laboro kaj Defendo" dekretis, ke la ŝtataj industri- kaj komerc-entreprenoj estas denun devigataj transdoni al la laboristaj organizajoj 10 proc. el siaj profitoj por la plibonigo de l' situacio de laboristoj. *Dneprano.*

En Bombay strikas 125 000 laboristoj de la kotonindustrio.

La usona ŝtata departemento volas forpeli ĉiujn fremdajn komunistojn el Usono, ĉar ili malkaŝe batalas kontraŭ la ŝtata perforto.

La japana parlamentejo en Tokio forbrulis.

En Ŝanĥajo la blankaj trupoj efektivigas la likvidon de la sindikatoj. Kelkaj sindikat-gvidantoj estas arestitaj, dum aliaj sukcesis forkuri.

Novaj terurajoj en Rumanio

La 31. aŭg. la estraro de l' Landa Fakkonsilantaro de unuecaj sindikatoj okazigis sian plenan kunsidon en Bukureŝto. Apenaŭ komenciĝis la kunsido, ekaperis en la ejo taĉmento da ĝendarmoj kaj arestis la ĉeestantajn 19 lab. gvidantojn kune kun unu ĵurnalisto ĉeestanta. Motivo: ili kongresis sen aprobo kaj priparolis ankaŭ nesindikatajn aferojn, kiel ekz.: komunumaj elektadoj, lab.-istaj ĉambroj. — La 1. sept. ili deklaris malsatstrikon eĉ nun daŭrantan por protesti kontraŭ la nelegalajoj. — Estas interese, ke la 1. sept. ili daŭrigis per la arestado interrompitan traktadon en la kelo, kien ili estis ĵetitaj. —

La 24. aŭg. estis sciigite al la redaktoraro de gazeto: A Világ — La Mondo — (ĉi-gazeto estas la sola hungarlingva por-lab.-kamparana gazeto en Rumanio) ke laŭ la ordono de ministro por internaj aferoj estas malpermesite sendi la gazeton en militan zonon; (milita zono ampleksas 150—200 km de la landlimo) estas malpermesite sendi la gazeton al komisiistoj kaj revendistoj, nur al abonantoj troviĝantaj en la krom-militzono. —

La 24. aŭg. komenciĝis en Kiŝinaŭ la proçeso de l' arestitoj el Tatar-Bunar. (v. Sennaciulo n-o 43) La akuzitoj nombras 412. Ĉi-homamaso kune kun la atestantaro, juĝantaro bezonas grandan ĉambregon, kia ne troviĝas en Kiŝinaŭ, kaj la proceso okazas sub libera ĉielo. — Estas notinde, ke la reĝa komisaro komence pledis por apliki la sistemon de najbara Cankov'a juĝantaro: dum 4 tagoj fini la tutan proceson! *"Skribemulo"*

[1]) Proksimume — 3 000 000 ormarkoj.

Kinematografo en servo de Proletaro

Kutime la kinematografo servas al kapitalismo. En Britlando ekzemple ĉiam kaj ĉie montriĝas bildoj pri la veturoj alilanden de la brita reĝido — la junula talismano de brita imperialismo. (Lasttempe li vizitas Sudan Amerikon por helpi la enpenetron de la brita kapitalo kontraŭ la Usona). En la filmo kiel en la romano, la heroo malriĉa gajnis per virto kaj laboro la monon kaj la sinjorinon. La kinematografo profitas el la malscio pri seksaj aferoj kaj intermiksas ridaĉojn, kisojn kaj ĉirkaŭpremojn.

Sed antaŭ du jaroj la sindikato de la poŝtlaboristoj en Britlando (la U.P.W.) produktigis filmon kiu rakontis pri la agito, la kresko kaj la numtempa laboro de tiu sindikato. Per bildoj de telefonejo, telegrafejo kaj poŝtlaboro en aeroplano, en ŝipo, en vagonaro ktp. ĝi kunigas la anojn kaj gajnas rekrutojn. Tre sukcesas la eksperimento.

Laŭ raporto en "Daily Herald" (25. 8. 25) en Usono la Usona Labor Federacio (A.F.L.) kaj alia labor-organizajo mendis filmon kiu montros la barakton de la laboristaro. Ĝi malkovras la tiranecon kapitalistan en la laborejo, la estintan evoluon el pli frua sklaveco kaj la infanlaboron. Esperebletia efektiva propagandilo uziĝos multloke. *488.*

Alvoko!

La "Laborista Esp.-grupo" en Gablonz aranĝos komence de oktobro Esperanto-ekspozicion kaj petas la gekamaradojn sendi ĉiuspecajn "Esperantajojn" (gazetoj, gvidiloj, prospektoj ktp.). Interŝanĝe ni povas doni aliajn Esperantajojn Pl. PM. ktp. Sendu plej baldaŭ!

Adreso: *Arbeiter-Esperanto-Verein* Gablonz a. Neisse, Friedhofstr. 12.

Aĉetu SAT-akciojn!

Iom pri loĝeja mizero kaj ĝiaj sekvoj

La stato de loĝeja mizero atingis gradon, kiu endanĝerigas la malhavantajn popoltavolojn timige. Pro la grunda monopolo de l' kapitalistoj precipe en pli grandaj urboj la prezoj por grundo kaj luo estas altigataj terurege. Kaŭze de tio la proletariaro devas multe suferi, ĉar por apenaŭ sufiĉantaj loĝejoj ĝi devas oferi grandparton de siaj enspezoj. Granda parto de laboristaj salajroj estas kvazaŭ tribute donataj al la grundposedantoj, al la domkaj grundspekulantoj. Apude okazas en higiena kaj seksa rilatoj plej danĝeriga kunpremado de la bedaŭrindaj familioj.

La loka malsanulkaso Berlina faris en 1923 statistikon inter 9500 kasmembroj pri ties loĝeja stato kaj konstatis, ke el tiuj ĉi (malsanaj, nelaborpovaj) dormas en unu ĉambro

kvarope	= 5 %	sesope	= 1 %
kvinope	= 2 %	sepope	= ½ %

Ĉi ciferoj adaptitaj al la tuta loĝantaro Berlina, kiu konsistas el 5 milionoj da homoj, donas la rezulton, ke ne malpli ol 250 000 p. dormas kvarope en unu ĉambro.

Sed ne nur neniun spacon ĉi tiuj homoj havas je dispono, sed ankaŭ ne propran liton. Ĉar estas science konstatita fakto, ke, ju pli granda estas la familio, des malpli granda estas la nombro de l' propraj litoj por ĝiaj anoj. Proksimume 20 procentoj da malsanuloj ne havas propran liton, devas dormi kune kun alia familiano, kaj el ĉi tiuj malsanuloj estas malsanaj genitale aŭ sekse 45 viroj kaj 684 virinoj. Jen bildo, kiel per la reganta loĝejmanko estas kvazaŭ vekataj kaj bredataj epidemioj kaj malsanegoj.

Ne pli bonon oni povas raporti pri la stato de la necesejoj en la Berlinaj loĝkazernoj. 52 procentoj el la supre menciitaj 9500 personoj devas uzi necesejojn, kiuj troviĝas ekster la loĝejoj aŭ en la domkorto, do kune kun aliaj familioj, sekve ankaŭ ĉi-kaze ekzistas la plej facila ebleco por infektado reciproka.

Plej ege suferas sub ĉi tiuj cirkonstancoj la infanoj kaj ties edukado. Inter ĉi 9500 kasmembroj estas 2286 laborantaj patrinoj. Tuttage en laboro estis el ili 850 patrinoj kun 897 infanoj, duontage 34 patrinoj kun 60 infanoj, dum kelkaj horoj 1053 kun 758 infanoj, kaj 349 patrinoj kun 533 infanoj trifoje dum la semajno, tiel ke entute 2286 patrinoj kun 2248 infanoj ne povas sin dediĉi sufiĉe al la edukado de siaj infanoj. La infanoj estas dumtage solaj, observas dum la nokto en la malvastaj dormejoj la plej intimajn aferojn inter la pliaĝuloj, kaj trankviligas nun neĝenate sian scivolemon. Kompreneble evoluas ĉe ĉi tiuj infanoj seksa troincitebleco, la seksa centro en la cerbo jam reagas al aferoj, kiuj sekse estas tute indiferentaj.

Kaj ĉi-ĉio ĉe normalaj infanoj, kiom pli altgrade ĉe psikopataj knaboj kaj knabinoj kun anormalaj sanstatoj. Timegige kreskas la nombro de seksaj malsanoj inter infanoj. Kiel ekzemplo jenon: En la stacio por sekse malsanaj infanoj de la Berlina Rudolf Virĥov-hospitalo estis kuracataj en jaro 1920 133 infanoj, 1924 jam estis 250, t. e. plimulto de 49%. En inversa proporcio je tio troviĝas la spirita evoluo kaj la korpa flegado de l' grandurbaj infanoj. Kvazaŭ entombigataj ili estas en la lum- kaj aermalmulthavaj kortloĝejoj de la loĝkazernoj, eterna malhelo estas en ĉi tiuj murŝaktoj, kuir- kaj rubodoroj pestumas la aeron, kaj ĉi loke ludas infanoj, infanoj de la proletariaro inter la rubujoj.

Estis farata iam post la milito statistiko, kiom da infanoj havas konojn pri sia ĉirkaŭaĵo kaj rezultis jena fakto:

La sunleviĝon ankoraŭ neniam	70%	da infanoj
la sunsubiron ankoraŭ neniam	54%	„ „
alaŭdon triladantan neniam jam aŭdis	82%	„ „
betulon ankoraŭ neniam	87%	„ „
ranon ankoraŭ neniam	53%	„ „
limakon neniam jam vidis	49%	„ „
grenkampon ne konis	49%	„ „

kaj 76% da infanoj ne sciis, kio estas roso.

Tiel la gejunularo de l' proletariaro devas spirite kaj korpe malprogresi.

Kia estas la plua evoluo de la infanoj, montras du praktikaj ekzemploj el Berlino en kortuŝega maniero. En Zorndorfer strato 37, unua transversa domo, loĝas en unu ĉambro kaj kuirejo du geedzoj kun dekjara knabino kaj dujara knabo. Ĉe ili loĝas de l' edzino fratino kun sia edzo, ĉiuj en unu ĉambro kaj kuirejo. Nun la onklo kulpiĝis per sangadulto kun sia dekjara nevino kaj infektis ŝin per gonoreo.

Alia, sociologe pli elokventa afero: Königsberger strato 37, 1-a flanka domo, unu ĉambro kaj kuirejo, en kiu loĝas la patro, 48 jara, la patrino, 46 jara, kvar filinoj 20-, 19-, 18- kaj 15 jaraj, kaj tri filoj, kiuj havas 16, 11 kaj 8 jarojn, entute naŭ personoj en la du ĉambroj. La patro same sangadultis kun siaj filinoj kaj troviĝas nuntempe en la frenezulejo Herzberge. La edzino komercas per ĉifonaĵoj kaj loĝas nuntempe en kelo kune kun unu filino, unu filo kaj sia 86 jara patrino. Ĉi kvar personoj dormas en du litoj.

La plej maljuna filino edziniĝis, du estas prostituitinoj, la kvara forkuris el deviga edukejo kaj estas nune kun danctrupo en Italio. La plej aĝa filo estas enkarcerigita pro legitimacifalsigo, la dua estas servisto.

Jen la sorto de Grand-berlina proletarifamilio. Kaj neniu prudenta homo povos fordisputi la fakton, ke plejgrandparton da kulpego je ĉi tiuj okazintaĵoj havas la tuta nuna sociordo kapitalista. Dum la unuj, t. e. la entreprenistoj, kiuj do neniom perlaboras mane, havas ĉion abunde, suficegan manĝaĵon, luksajn domojn ktp., la aliuj, la subuloj, kiuj de frumatene ĝis nokte peze kaj penege laboras, havas malmultan enspezon kaj nutraĵon kaj loĝas krom tio en tiaj mizeregaj kavernoj, kiuj estas la kovejoj de gonoreo, sifiliso, tuberkulozo ktp. kaj en kiuj perfortoj kaj sangadultoj estas oftaĵoj. Ni lernu el tio: Neniu proleto, ĉu ino ĉu viro, plu staru flanke. Ĉies devo estas, kontraŭbatali la kapitalisman sistemon renversindan, kun ĉiuj siaj fortoj, por atingi fine pli bonan sorton.

Vivu libereco!

Laŭ artikolo en la liberpensula gazeto "Der Atheist"

Akuzanto

DISKUTEJO

Kiu devas eduki infanojn?

Kiam la burĝaro deziras trafe montri al la gelaboristaro malbonajn flankojn de l' Soveta regadmaniero, ĝi ĉiam komencas paroli pri Sovetia leĝo, nomata de ĝi leĝo pri am-libero, pritraktante ĝin kiel rimedon disfaligi familian esencon, senhonorigi virinon ktp.

Sklavecaj enfamiliaj interrilatoj penetradis nian vivmanieron dum multaj jarcentoj, kaj tial ni tre malfacile komprenas ĉion puŝantan nin sur vojon al komunismo, al stato individua de l' nenion-havanta ĉion-posedanto.

La sovetlanda gelogantaro, ankaŭ diversmaniere komprenas ĉi-leĝon, kaj la plej malgrandaj okazintaĵoj elvokas ofte tre ekscitajn disputojn pri efektiva esenco kaj signifo de la leĝo pri "libera geedziĝo."

Numero 118 de la "Raboĉaja gazjeta" (Laborista gazeto) dediĉas denove al ĉi demando kelkdekon da linioj. Ĝi publikigas leteron, kiun sendis al la redaktejo laboristo-korespondanto, kaj ĝi petas gelegantaron sendi siajn opiniojn pri situacioj tuŝataj en la letero.

Ĉi-sube mi donas plenan tradukon de la letero:

"Oni diras, ke ni havas geedziĝon liberan, mi do certigas, ke ĉi-libero nur estas Jaŭvorta, en vivo do tiu ĉi "libera geedziĝo" kaŭzas nur sin-venenigon per sublimato aŭ striknino.

Jen al vi pruvo:

1) Vi ne povas pace vivi kun edzino, malgraŭ tio, ke vi travivis kun ŝi jam 2—3 jarojn. Post eksedziĝo popola juĝo konfiskas viajn enspezojn, kaj de nun vi fariĝas sklavo de tiu leĝo, kiu havas nomon "libera geedziĝo".

2.) Vi estas edziĝinta duafoje, kaj vi havas familion 5—6 personan. Kial do oni daŭrigas deprenadi 25% de viaj enspezoj por la unua infano ĉe via unua edzino kaj por la infanoj, kiujn vi havas, restas nur po 12%?

3.) Ni supozu ke vi perdis vian laboron. Kial — do popoljuĝo vendas vian lastan havaĵon, forprenas de vi lastan pecon da pano, daŭrigante forprenadi 25% da neekzistantaj enspezoj?

4.) Vi ne konsentas al la decido de l' popoljuĝo. Vi kasacias ne pagante dume monon. Via kasacio kuŝas 5—6 monatojn sub drapo (restas nepridiskutata) kaj poste oni al vi deklaras, ke la decido de l' popoljuĝo restas neŝanĝita, kaj oni prenas de vi jam ne 25%, sed 50% por ricevi ĉion por la pasintaj monatoj.

Turnu kiel vi deziras, kaj ĉiuokaze laboranto estas sub la ŝarĝpezo de tiu ĉi leĝo, kaj li ricevas impreson ke la belaj vortoj de l' sovetaj leĝoj estas nur ŝirmilo. Per tiuj ĉi leĝoj ni nur plimultigas prostitucion, ĉar multaj virinoj facile sin fordonas al viroj sciante ke ili povas aŭ ilin edzigi je si aŭ ricevi parton de iliaj enspezoj. Tiuj-ĉi leĝoj kaŭzas ke edzo aŭ forkuras de edzino aŭ sinmortigas. Iafoje, por ne perdi siajn enspezojn, oni mortigas infanojn. Kial do ĉion ĉi devas toleri laboristo? Li ja estas plenrajta mastro de sia regno, ni do vidas ke oni je nomo de laboristoj konfirmas leĝojn, kiujn laboristoj peranime malaprobas.

Tiujn-ĉi leĝojn oni eldonas por sensklavigi virinon, sed ja oni ne devas sensklavigi virinon sklavigante laboriston-viron. Estas necese kiel eble plej baldaŭ depreni de la laborantoj ĉi ŝarĝon, tion ni povas fari jen kiamaniere:

La infanojn devas eduki regno. Rimedojn por edukado de infanoj ni devas havi.

Laboristo kaj infanoj ekster tiuj ĉi cirkonstancoj vivas duonmalsate. Li dum tuta vivo penis forigi leĝojn, kiuj defendas posedantajn (burĝajn) klasojn, nun do okazas, ke oni aranĝas ankoraŭ pli malbonajn kondiĉojn vivajn por laboristoj."

Jen unu opinio pri "libera geedziĝo" kiun per gazeto esprimis unu el sovetlandaj laboristoj. Tiun-ĉi opinion la sovetlanda gazeto proponis pridiskuti al sia gelegantaro, mi do proponas ĝin pridiskuti al la gelegantaro de "Sennaciulo". Nuna vivado de l' sovetlanda laboristaro ne estas komunisma vivado de l' popolo tute aparta de vi. Ĝi estas serĉado de l' vojo al komunismo, al nia, al via, al la tuthomara morgaŭa tago. Ĉar ni serĉas vojon, kiun morgaŭ ni ĉiuj devas iri, vi devas ankaŭ laŭeble partopreni tiun-ĉi serĉadon. El la supra letero vi vidas ke ni serĉas estontan familiordon. Diru vi ankaŭ viajn opiniojn. Por ke tiu ĉi diskuto estu pli plena ni tradukos viajn leterojn por nia gazeto. Sendu viajn verajn netimemajn (ĉar ni havas laboristan, sed ne burĝan registaron) opiniojn laŭ la adreso: Moskvo Centra Telefonstacio. Al Olga Ĵukova. Se vi timas ke via registaro persekutos vin pro via vera opinio, sendu pere de redaktejo de "Sennaciulo". *H. Ponjatovskij*

Se ni donas multe da ideoj al malgranda homkvanto, — tio estas propagando; se ni donas unu ideon al granda homkvanto, — tio estas agitado. Plehanov.

Pri cionismo

Se mi respondas al la artikolo "Cionismo hebrea formo de ŝovinismo" de k-do Revo, mi faras tion, ĉar mi volas kontraŭbatali tiun malbonan kutimon de l' SAT-anoj ĉion prijuĝi kaj kondamni tuj en la unua momento starante sur ideologia bazo de sennaciismo kaj socialismo, sed ne konante la problemon, pri kiu ili parolas kaj ne penante antaŭe pli bone informiĝi pri ĝi.

Tiel agis ekz., skribante pri cionismo, k-do Revo, kies opiniojn mi cetere ŝatas aŭdi kaj legi. Mi ne estas ano de cionismo, nek de alia formo de hebrea naciismo, ĉar mi estas sennaciulo, sed tio ankoraŭ neniel rajtigas min kondamni tiun movadon.

La unua atako de k-do Revo kontraŭ cionismo, riproĉante al ĝi, ke "en periodo, kies ĝenerala disvolviĝo iras al pli kaj pli malvasta alproksimigo de la diversaj nacioj, forviŝante pli kaj pli la naciajn karakterecojn, al kunfando ekonomia, politika kaj lingva de ĉiuj nacioj de la tero, la cionistoj volas — almenaŭ politike — apartigi unu nacion, ĉe kiu la internacia kunfandprocedo historia jam estas tre progresinta" perdas tuj sian signifon kiam li diras: "sed ni tre bone konsciiĝas, ke ni estas pioniroj de malproksima estonto kaj ke la venontaj paŝoj de historio ne kondukos jam al forigo, sed *al liberiĝo de la nacioj*". Li tie-ĉie ne plu riproĉas al la cionistoj naciismon, sed nur diras "ni devas nin demandi, per kiaj rimedoj la hebreoj estu liberigotaj, kaj ĉu la solvo proponita de la cionistoj estas bona". La ĝusta rimedo ŝajnas al li tiu, donita de Karl Marks, kaj ĉar la cionistoj ne tute konsentas kun tio, li nomas la cionismon "burĝan kaj ŝovinistan movadon".

Sed mi ne volas tie-ĉi paroli pri opinio de k-do Revo aŭ de aliaj personoj; kion k-do Revo pensas, tio estas lia afero kaj li tute rajte komunikas siajn pensojn ankaŭ al aliaj. Sed senrajte li diras jenon: "La hebrea nacio estas en Palestino reganta nacio — reganta sub brita, t. e. sub internacia financestrara protekto. La reganta nacio de Palestino formas 10 ĝis 12 procentojn de la loĝantaro. Ĝi ekspluatas kaj subpremas la arabojn, kiuj estas la grandega plejmulto en la lando. El la "lando de profetoj" fariĝis lando de profitoj, kaj araba sango jam kelkfoje ruĝigis la stratojn de palestinaj urboj. "Li simple ne estas informita kaj tute alie parolus, se li estus ekz. leginta la verkon de la komunisto Arthur Holitscher: "Reise durch das jüdische Palästina" (Vojaĝo tra la juda Palestino). La judoj absolute ne estas la reganta nacio en Palestino, kaj la brita imperio, kiu surpapere donis la landon por konstruota hejmo, en la realeco donas al la araboj ĉiun ajn eblan preferon, por tiamaniere eksciti la du popolojn unu kontraŭ la alia, la judojn pro tiuj preferoj (ekz. allaso al ŝtataj oficoj, subtenoj de lernejoj ktp.), la arabojn pro la juda enmigro, kiu celas fari el Palestino judan ŝtaton. La britoj agas do laŭ principo de "divide et impera", sed tamen nur malgranda tavolo de l' araboj malamas la judajn enmigrantojn, nome la "efendioj", la sinjoroj, la terposedantoj kaj nur ilia fiagado kaŭzis, ke en Palestino fluis araba, kaj ankaŭ juda sango.

La arabaj laboristoj, la t. n. felaĥoj estas plej energie subtenataj de l' judaj kolonistoj, kiuj ilin organizas, enprenas ilin en siajn kooperativojn, kaj estas interese konstati, ke eĉ okazis jam komuna striko de judaj kaj arabaj transportlaboristoj. La diraĵo de k-do Revo, ke "tia socialista organizaĵo (t. e. de la judoj) realiĝas sur la dorso de naŭdekonoj da ekspluatataj homoj nehebreaj, ne partoprenantaj tian organizaĵon kaj ne ĝuantaj la rajton de la premantoj" estas senbaza, la hebreoj kontraŭe revoluciigas la arabajn laboristojn kaj instruas al ili sciencajn labormetodojn. Same estas rekta renverso de l' faktoj, se oni diras, ke la hebreoj ekspluatas kaj subpremas la arabojn, ĉar neniu arabo estas en servo de hebreoj, des malpli, ĉar la "halucoj", la enmigrantoj hebreaj estas preskaŭ ekskluzive laboristoj, kiuj faras la plej pezan fizikan laboron.

Ni povus al cionismo riproĉi, ke estante nacia movado, ĝi kontraŭas al nia idealo pri sennaciismo, sed ni ne forgesu, ke da sennaciuloj ekzistas nur 3000, kaj ke sen Esperanto — laŭ k-do Revo mem — sennaciismo ne povus realiĝi, ni do ne povas postuli, ke oni rekonu sennaciismon, se la mondo eĉ al Esperanto ankoraŭ heziteme rilatas kaj se oni eĉ en Sovetio helpas al la nacioj krei sian propran kulturon.

Arthur Holitscher diras en sia suprenomita verko: "Se mi estus antaŭ unu jaro hejmenportinta el Rusio dubon pri la ideo de l' komunismo, Palestino estus redoninta al mi la certecon". Fakte la socialismo en Palestino faras efektivan laboron, ne kiel en kelkaj aliaj landoj, kie oni multe da teoriaĵoj verkas pri socialismo, sed nenian realan profiton eltiras el ĉi-laboroj por la laboristaro.

Konklude mi petas la k-dojn pripensi kaj informiĝi antaŭ ol ili ion skribas kaj petas speciale k-don Revo, ke li ne ĉagrenu pro miaj kritikoj.

E. Sonnenfeld 968

Iom pri esp.-ekspozicioj

De tempo al tempo, eĉ sufiĉe ofte, en "S." aperas alvokoj kaj petoj pri alsendo de div. esperantaĵoj por aranĝataj ekspozicioj.

Kiaj estas la rezultoj de ĉi alvokoj kaj ĉu ili atingas la celon? Mi dubas. Flankenlasante tion, ke la anoncpetoj aperas plejparte malfrue, kiam la eventualaj sendaĵoj eĉ el pli proksimaj landoj jam ne povas ĝustatempe atingi la petintojn, mi ne estas certa ke troviĝas tiom da fervoruloj, konsiderantaj sukcesigon de iea ekspozicio kiel sian taskon. Kelkaj p. k. il. kaj paro da gazetoj estas verŝajne sola profito de simila agado. La rezultatoj do estas negativaj: la ekspozicio malmulte efikas la vizitantojn kaj la aranĝintoj riskas senreviĝi pri helpemo de alilandoj k-doj. Tamen oni ne kulpigu tiujn, ĉar ne estas eble havigi al ĉiu deziranto taŭgajn ekspozaĵojn, kiel valorajn eldonaĵojn kaj pli efikajn propagandilojn, bezonajn por bone kaj serioze pripensita ekspozicio kaj aliflanke ne ĉiu propagandemulo kaj eĉ grupo kapablas kaj sukcesas aranĝi ekspozicion tia, kia ĝi devas esti, ĉar, kiel mi mem spertis, tio postulas sufiĉe da tempo, laboro kaj elspezoj. Resume alia vojo estas sekvenda.

Ekspozicioj esp. estas unu el la plej efikaj propagandmanieroj, kondiĉe se ili estas bone kaj trafe aranĝitaj kaj la afero ŝajnas al mi priatentenda se ni volas altiri al nia movado vastajn rondojn de l' proletariaro. Evidentas, ke ĝi estas tasko de *landaj kaj regionaj lab-istaj esp. organizaĵoj*, aŭ de la de ili elektitaj komisionoj, ĉar centraj organizaĵoj posedas pli da sperto kaj rimedoj ol malgrandaj, finance malfortaj, provincaj grupoj kaj izoluloj. Ĉi tie mi ne pretendas doni skizon de l' "bone aranĝita" ekspozicio kaj ne ĝi estas tasko de ĉi vortoj. Mi volas nur atentigi ke tia, sisteme aranĝita, ekspozaĵaro, provizita per diagramoj, granda surmura geografia karto (-oj) k. c., ilustrantaj la nunan staton de nia movado kaj tiun de SAT kaj iliajn progresojn, estas uzebla de ĉiuj samlandaj (samlingvaj) grupoj ĉe plej diversaj okazoj. Organizante tiajn migrantajn ekspoziciojn oni progresigas la movadon ĉe laborularo kaj evitos la neproduktivan perdon de tempo kaj energio flanke de l' organizantoj — petantoj kaj iliaj eventualaj kunhelpantoj — la petatoj.

R. Lorentson. (1929)

Kio okazas en via lando?

Pri tio volonte scius la klaskamaradoj de aliaj landoj. Sekve sciigu tion al ili per Esperanto! Sed kiel, ĉu ne? Do ni estas pretaj komenci. Sendu mallongan raporton pri la lastaj okazintaĵoj en via lando, kiuj interesas la laboristojn de aliaj landoj, al "Prolet. Esperanto-Presservo, Gerberstr. 24 H, Leipzig (Germanio)". Ni senprokraste sciigos al vi ĉu ni povis uzi vian raporton por la laborista gazetaro. Eble kun la respondo ni jam povos sciigi al vi adresojn de k-doj en aliaj landoj, kiuj volas partopreni la presservan laboron peresperantan. Nia ĝisnuna peno tiurilata pruvis, ke tiu peresperanta laboro pli propagandas por nia lingvo, ol se ni presigas propagandartikolon en la gazetaro. Estas kompreneble, ke la laboristaro timas trompon en ĉiu rilato, pravege. Do pro tio ni pruvu per nia praktika laboro ke Esperanto estas vere taŭga kaj tute perfekta lingvo, kiu nepre necesas por la internacia laboristmovado.

Ni estu veraj kaj indaj SAT-anoj uzante Esperanton por niaj klasaj celoj. Ni atendas vian materialon kaj promesas samtempe materialon por la vialanda gazetaro niaflanke.

Malpli ol ĝis la revolucio!

La nombro de mortoj en Sovetio mirige malkreskas. La statistikoj konstatas nun *24* mortojn inter *1000* loĝantoj ĉiujare, kontraŭ la ĝismilitaj ciferoj: *26* por *1000*. En Moskvo (malgraŭ la evoluo de ĉi-urbo, nombranta aŭguste 1925 jam 2000000 loĝantojn) oni konstatas 14 mortojn por 1000 loĝantoj, t. e. same, kiel ĝis milito en la bonaranĝitaj britiaj urboj.

(*"Komunala Fako, N-o 11—12) Moskvo.*

Kultureco de l'demokratio

La venkinta burĝaro eĉ postmorte malamas sian malamikon. Laŭ moskva "Izvestija", finnlanda lab-ista gazetaro sciigas ke la tombejo, en kiu estis enterigitaj labistoj, falintaj en civitana milito de 1918, estas laŭ ordono de l' registaro uzata kiel brutarejo (ЗАГОИ). Estus interese aŭdi de finnaj kamaradoj detalojn pri ĉi-fiago de l' finnaj "buĉistoj". *1929.*

Ĉe la "sendiuloj"

La okazinta en Moskvo paskon 1925 Unia Kongreso de l' "sendiuloj" (ateistoj) reprezentis 140000 organizitajn ulojn. La kongreso estis la naskejo de "Tutsovetia Societo de Sendiuloj" kiu en komenco de somero nombris 300000 anojn, en aŭgusto — 450000.

La societo aliĝis al la Proleta Internacio Ateista, fondita ĉi-jare dum la kongreso en Teplitz (Ĉeko-Slov.). *Dneprano.*

Deveno de edziĝa ringo

Fragmento el "Edziĝo-aĉeto".

M. Kosven.

En sia kultur-historia evoluo homaro travivis tian formon de edziĝa komerca kontrakto, ĉe kiu oni vendas kaj aĉetas virinon, kiel varon, transirantan de unu posedanto al la alia.

La fakto de tiu aĉeto-edziĝo, aŭ aĉeto-vendo de l' virino en formo de edziĝo, montriĝas hodiaŭ tute senvualigite ĉe tre multaj popoloj duonkulturitaj kaj klare elstariĝas ĉe tre karakterizaj travivaĵoj en la kutimoj de ĉiuj popoloj, okupantaj eĉ la plej altajn ŝtupojn de l' kultur-ekonomia evoluo.

La procedo en edziĝo-komerca kontrakto esence neniel diferencas de tiu en ajna alia aĉeto-vendo de movebla havaĵo: aĉetanto pagas la prezon kondiĉitan, kaj la vendanto transdonas la objekton venditan. La samajn principojn ni trovas ankaŭ en edziĝaj ritoj, kaj ju pli, tiel diri, integre kaj primitive estas konservata la aĉeto-edziĝo, des pli simple ties ceremonio reduktiĝas al ĉi-procedoj, kiuj plene determinas la kontrakton.

Kiel sciate, en komenca stadio la transiron de l' proprecrajto oni estis devigataj marki per reala ekkapto de koncerna objekto helpe de l' mano ("mancipatio" — ĉe romanoj). Pro tio, interalie, la romana "manus", antikve-germana "munt", samkiel la rusa "rukà" (la mano), ne nur signifas la manon, kiel korpoparton, sed samtempe esprimas ankaŭ koncepton pri posedo aŭ proprecrajto. Precize en sama maniero la plej simpla ceremonio pri virin-transdono de unu al la alia posedanto en la komenco reduktiĝas al simpla, tamen tute reala enmanigo de l' virino aĉetita. Ekz., hebrean edziĝan riton konsistigas, ĝustadire, la du ĉefaj agoj — "erusin" (fianĉiĝo), t. e. monpago, kaj "nissuin" — laŭvorte "ekpreno".

La ceremonio pri fianĉinfordono de vendantoj al aĉetantoj estas edziĝo-festa rito, vaste praktikata. Sed simile al tre multaj proceduj, kies agantoj komence estis reprezentantoj de l' grupoj, ankaŭ ĉi-tiu ceremonio individuiĝas, do fianĉinon oni enmanigas jam senpere al la fianĉo.

Primitiveco karakterizas jenan antikvan riton de *mordvoj*: la patro de fianĉino, preninte ŝian manon, enmanigas ŝin al la gepatroj de l' fianĉo, kaj poste ŝia frato, siavice, elhejmigas ŝin je la mano, transdonas al sekvantaro de l' fianĉo, kaj la fianĉino forveturas. Tre maloftan kaj emfazan varion el blankrusaj moroj konigas etnografiisto Dobrovolskij: la patroj de gefianĉoj, tenante la gejunulojn je la manoj, elpaŝas unu kontraŭ la alia; je ĉiu paŝo la patro de l' fianĉo elparolas: "Mi al ci-foj', mi al ci-du, mi al ci-tri, donu knabinon tien-ĉi!" Poste la patroj donas inter si la manojn, samtempe kunigante la gejunulojn, kiuj ankaŭ reciproke sin manprenas.

Ritoj pri fianĉin-enmanigo senfine variiĝas. Ekposedo (per ekkapto) de l' fianĉina mano, poste aliformiĝinta en la riton de mankunigo de gefianĉoj, kiel duonreala, duonsimbola konfirmo de l' rajto akirita, estis konata jam al hindaj Vedoj kaj akceptita de indo-eŭropaj kaj kelkiuj aliaj gentoj (mongoloj, negroj k. c.). Jen de kie venas, interalie, ankaŭ la esprimmaniero, malfremda al ĉiuj lingvoj indo-eŭropaj: "peti la manon", "ricevi la manon".

Oni scias, ke en antikva Romo reala ekposedo de l' objekto aĉetata aliaspektiĝas en sia jena pli posta formo: la aĉetanto nur tuŝas permane la objekton en ĉeesto de atestantoj, eldiras laŭregulan formulon, frapas per kupra peco aŭ per monero kontraŭ pesilon kaj transdonas ĉi-pecon aŭ la moneron (kiel antikvatempe — la pagon mem) al la vendanto. Sammaniere ankaŭ la romana edziĝoprocedo en sia civita formo — simile al aĉeto de movebla posedaĵo — estis akompanata de t. n. ceremonio "per aes et libram" (per kupro kaj pesilo): la fianĉo en ĉeesto de atestantoj metas sian manon sur la fianĉino, elparolas formulon kutiman, frapas per metalpeco kontraŭ la pesilon kaj fordonas ĉi-pecon al la gepatroj de l' fianĉino.

Kiel specifan travivaĵon de tiu ektuŝado je fianĉino, ni povas nun deĉifri la sufiĉe oftan kutimon, kiam oni batas laŭrite fianĉinon por simbole signi transiron de l' proprecrajto; ĉe kelkaj gentoj ĉi-kutimo reprenas pli senvualan aspekton — la fianĉinon batas unue ŝia patro, estante ŝia origina posedanto, kaj poste la fianĉo, kiel ties rajtheredanto; ĉe aliaj gentoj tiun rolon plenumas nur la fianĉo. Antikvatempe en Grandrusio la patro de fianĉino, ekskurĝinte sian filinon, poste estis transdonanta la skurĝon al la fianĉo. Same frapetas la fianĉinon sinsekve la patro kaj la fianĉo ankaŭ ĉe felaĥoj kaj samboligento. Ĉuvaŝaj fianĉoj kaj tiuj de macedona Bulgario trifoje ekbatas la junulinon post la edziĝa festo. En Kroatio la junulo per delikata ŝirpinĉo je l' fianĉina orelo signas, ke denun, li estas la mastro. Kaj en ĉi-okazoj la popola kreadprocedo traktas la kutimon simbolsence, prefere kiel transiron de l' povo, ol tiun de proprecrajto. Malgrandrusa fianĉo, ekfrapetante trifoje kontraŭ la dorson de l' fianĉino, en la momento, kiam ŝi forlasas sian hejmon, elparolas: "Lasu la patrajn morojn kaj prenu la miajn."

Elpago de l' prezo kontraktita, kiel kvitiĝo de l' aĉetinto, en primitiva formo de edziĝoprocedo evidente havas neniun komplikitan vestiĝon. Ankaŭ ĉi-tie la rito individuiĝas, kaj pago al virinvendantoj aliformiĝas, kiel travivaĵo, en tiun, pagatan al fianĉino mem. Donaco al fianĉino, la kutimo, larĝe aplikata, povas esti rigardata kiel alia markoto de l' sama procedo. Similan travivaĵon ni jam havis okazon vidi en la romana metalpeco aŭ monero; identan travivaĵon konservas ankaŭ l' antikva hebrea edziĝa rito. Fine, nedubeble de sama speco fragmento estas la indo-eŭropa edziĝa ringo. Oni nur ekmemoru, ke la mono metala komence estis ĝuste ringo-forma. Laŭ antikva rito fianĉo estis donacanta ringon al sia fianĉino, kaj poste oni komencis interŝanĝi ringojn. Ankaŭ tie-ĉi la senco origina malklariĝas dank' al popola kreadprocedo, per kiu la ringo fariĝas simbolo de gejunula kuniĝo en geedza ligo.

Tiel, malgraŭ ĉio, la senkulpa ringo, kiun ankoraŭ nun oni trovas sur fingroj de multaj el ni, estas tiu ĉenero, per kiu ni estas ligataj al la pratempa pasintaĵo de l' homaro. Elrusigis *V. Zamjatin*

M. Boguslavski

la prezidanto de "malgranda Popolkomisaria Konsiliĝo" de RSFSR.

pri Esperanto[1]

* * *

"Inter la multaj baroj sur la vojo al efektivigo de l' devizo, «Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu», — la diverslingveco estas unu el la plej grandaj. La ekzistado de multaj lingvoj sen iu dubo malfaciligas la batalon de l' laborista klaso pro ĝia emancipo. Ĉar finfina venko estas ebla nur se la batalò estas farita en ĉiuj landoj laŭ unu plano, dum sama tempo. En tio kuŝas nun la precipa senco de l' unuecfronto de l' ĉiulandaj laboristoj. Speciale bonvidebliĝis la "maloportuneco" de l' diverslingveco dum la nedelonge faritaj vizitoj de Sovetio de la delegitoj el Francio, Anglio, Belgio, Germanio, Svedio. "Kion fari?" — eldiras malespere la ruĝarmeanoj de l' Oktobra Tendaro, kiam alproksimiĝis la germana laborista delegitaro, — "ni ja ne scias la german-lingvon! Kiel ni al ili ĉion klarigos?" "Eh, kvazaŭ mutaj ni estas" diras la laboristoj de l' Sokolnikia vagon-uzino en Moskvo dum la vizito de l' sveda laborista delegitaro, — "tiel granda estas la deziro intime interparoli, sed estas ne eble". Da tiaj momentoj tragediaj, kiam samklasaj fratoj ne eblis eldiri unu al alia ĉion, kion ili deziris, estis multe.

El la unuaj vizitoj de nia Unio flanke de l' alilandaj laboristaj delegitaroj, inter aliaj konkludoj ni devas fari tiun pri la neceseco *antaŭenpuŝi (kaj forte antaŭenpuŝi)* la lernad-laboron de l' internacia lingvo inter la laboristoj. Je tio devas sin okupi ne nur ni, sed ankaŭ la frataj partioj alilandaj. Devas esti farita efektiva ĉiuflankeca subtenado de "Sovetia esperantista unio", kies ĉefa celo estas: "la larĝa disvastigado de esperanto inter la organizitaj laboristoj kun celo utiligi la lingvon, kiel ilon en la klasbatalo kontraŭ burĝaro por la socialista laborista revolucio sur internacia skalo."

Estas malfacile komprenebIe, por nekompetentulo juĝi pri la "idealeco" de l' lingvo esperanto. Sed alia *sennacieca* lingvo ne ekzistas, se ne konsideri kelkajn malsukcesajn projektojn en tiu direkto. Kaj necesas efektive meti esperanton je la servo de l' proletaro. Kaj tion necesas des pli urĝe fari, ke la internacia burĝaro jam aplikas ĉi lingvon por siaj celoj. . . . La profesiaj sindikatoj, laboristaj kluboj, junulara ligo devas enmeti en siajn laborplanojn la lernadon de l' lingvo esperanto, kiel helpa serva lingvo por la plej rapida efektivigo de l' devizo:

"Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!"

Kislovodsk, 28.VII.1925. *M. Boguslavski.*

[1]) El artikolo pri esperanto kaj la broŝuro de E. Izgur "Internacia lingvo je la servo de proletaro".

Promenoj kaj promenetoj sur marĝenoj de esperantaj gazetoj

21. Pri reform' de kalendaro, pri biblio kaj dolaro.

En n-o 5 (majo 1925) de "Esperanto" oni povas legi interesan artikolon pri reformo de kalendaro; ĝi traktas pri difektoj de la nuna kalendara sistemo, parte pri historio de tiuj difektoj kaj ĉefe pri la reformo-planoj. Ni ekscias el la artikolo, ke la Ligo de Nacioj sin okupas pri tiu problemo kaj komisiis al sperta fakulo klasigi la ricevitajn ĉirkaŭ 100 reformprojektojn. La lasta jam sukcesis eligi el la tuta aro du utilajn metodojn por plibonigi la kalendaron, sed . . .

„La hebreaj rabenoj, kiujn ni ĉiuj plene respektas, pro la dimanĉa ripozo kiun ilia religio alportis al Kristanaro, estas preskaŭ la solaj konstraŭstarantoj al tiuj ĝustigoj de ambaŭ planoj"

ĉar la ambaŭ planoj por hebreoj estas akcepteblaj nur

„se la hebreoj akceptas la internacian dimanĉon. Sed la rabenoj diras, ke ili ne faros tion, ĉar tio ruinigus ilian religion"

Nenio miriga estas por ni en tio: la religio kaj la eklezio montriĝas al ni kiel fortoj reakciaj kaj malprogresigaj, do nur nova pruvo pri tio estas nun antaŭ ni. Tial estas precipe interese observi, kiamaniere la komisiito de la Ligo de Nacioj esperas venki tiun baron de la religio:

„Sro Cotsworth (la komisiito) scias ke, antaŭ ol veni en la komitaton, la eminentaj rabenoj havis nek tempon, nek oportunecon taksi la financan kaj praktikan profiton, kiun ricevus ĉiu hebreo per kalendara reformo. Dum unu jaro li studadis la problemon ĉe hebreoj de New-York kaj konvinkiĝis, ke hebreoj sin okupantaj pri banko kaj komerco trovos certan profiton per akcepto de internacia dimanĉo, kaj ke la rabenoj ne povas krei opozicion ĉe la plimulto de la hebreoj, kiam ili realigos la profiton donitan al la homaro per internacia dimanĉo."

Jes, se temas pri profitoj, precipe financaj, ni povas esti certaj, ke dolaro venkos la biblion kaj ke la reformo povos esti efektivigita. Sed ni ne kredas ke pro la kalendar-reformo povus okazi gravaj konfliktoj inter biblio kaj dolaro: ja la biblio facile sin adaptos al postuloj de l' dolaro kaj, kiel antaŭe, ili en intima kuneco daŭrigos sian laboron.

Kaj kian utilon havos el tiu kalendara reformo laboristaro? Pri tio silentas la neŭtrala organo en sia nesubskribita (ĉu redakcia? ĉu privata?) artikolo. Ni kuraĝas respondi: nulan, se ĝin efektivigos Ligo de bankistoj kaj komercistoj . . pardonu: de Nacioj, ĉar ili (la bankistoj kaj komercistoj) estas reformemaj nur se temas pri financaj profitoj por ilia propra poŝo.

Alia ulo el Moskvo.

"Amuza Anguleto"

I.

Plej mirinda mia sorto:
Estas mi mallonga vorto;
Nur inigu min, kolego,
Kaj el longa riverego
Vi ricevos kun admiro
Nomon de la granda viro.

4967.

II.

iLn kaj nClOa

4967.

RECENZEJO

Libroj

Psikanalizo kaj Edukado de *Pierre Bovet*, prof. ĉe la universitato de Genève kaj direktoro de la Instituto J. J. Rousseau. — 4, rue Charles Bonnet, *Genève* (Svisl.) — 40 paĝoj. Form. 14½×21 cm. — Prezo nemontrita.

La interesa libreto aperis dank' al la financa subteno de s-ino D. H. Morris el Usono (subteno, kiun ni lab. esp-istoj bedaŭrinde ne ĝuas). Ĝia celo estas, doni al edukistoj profiton el psikanaliza metodo. Tro malamplekse ja estas pritraktita la temo, kelkaj punktoj nur estas tuŝetitaj: tamen la koncizeco, al kiu devigas la eta amplekso la aŭtoron, ne malfaciligas la komprenon. Entute la verketo por ĉiu interesulo estas sufiĉe senpene legebla, eĉ por laiko. Plej interesa ŝajnas al mi la lasta parto, kiu pritraktas la aplikojn de analiza psikologio al infanedukado. La valorajn konsilojn tie donatajn bezonas ankaŭ la nepedagogo, ĉiu patro, ĉiu patrino, entute ĉiu, kiu havas rilatojn al infanoj.

Preseraroj bedaŭrinde ne maloftas en la broŝuro. *N. B.*

Postmorta vivo. Propaganda broŝureto (12 p.) de Oomoto-movado. Eld. Oomoto, *Ajabe*, Kioto-fu, Japanio.

Alfred Rehtz, Der grüne Stern. Poemaro en germana lingvo. Eld. Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt. 32 pĝ. Form. 12½×17 cm. Prezo nemontrita. Tre lertaj poemoj propagandantaj taŭge esperanton kaj esperantismon (pacifismon).

Gazetoj

Represis el S-ulo: *Le Drapeau Rouge*, Bruxelles. 19. 8. Elfosado en Samarkand (S. 36), *Sächs. Arb. Zeitung*, Leipzig, 8. 9., Brit. lab. gvidantoj pri Esp. (S. 31). *Berg. Arbeiterstimme*, Solingen, 8. 9., Impr. el Sov. Unio (S. 48). *A Patria*, Loanda, 6. 8., Radio-inf. (div. n-oj).

Represis el S.R.: *Prukopnik Svobody*, Wien, 15. 9., Sekr. de Danubo (majo). *Arbeiter-Stimme*, Dresden, 12. 9., La sengambulo (julio). *Ki-Ki-Ri-Ki*, Loanda, 31. 5., 1. 7., Seksosignoj (feb.).

Pri V. SAT. Kongreso: *Ruhr-Echo*, Essen, 28. 8. *Ostthüringer Tribüne*, Gera, 23. 8., *Le Drapeau Rouge*, Bruxelles, 13. 8., *Intern. Presse-Korrespondenz*, Wien, Nr. 36. 5. Sept. *Prukopnik Svobody*, Wien, 15. 9. *A. Világ*, Targu-Mureŝ, 22. 8., *Holzarbeiter-Zeitung*, Berlin, 12. 9.

Enpresis div. notojn k. art.: *Daily Herald*, London, 11. 9., pri sukceso de esp. ĉe sindik. kongr., *Berg. Arbeiterstimme* Solingen, 11. 9., same., *Ki-Ki-Ri-Ki*, Loanda, 18. 4., art. pri Zamenhof kaj Esp.

Atentigo

Ĉiuj miaj korespondantoj kaj amikoj estas avertataj, ke mi forlasis Rusion kaj tial ne plu skribu al mi. En urĝaj okazoj skribu al: *H. Manske*, Breite Str. 4, *Berlin-Schmargendorf.* A. Levandovski, Iniciatinto de ISAB.

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)